

# POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO.

## ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE.

ROK XXI. JARO.

KRAKÓW  
M A J 1927 M A J O

Nr. 5. N-o

## KIEDY ESPERANTO ZWYCIĘŻY?



ARTYKULE „Czterdzieści lat próby“ wykazałem, że Esperanto w ciągu 40 lat swego istnienia, okazał się językiem doskonałym, że pokonał wszelkie trudności, jakie napotykał przy wkraczaniu do coraz to nowych i wyższych dziedzin językowo-cywilizacyjnych i co szczególnie na podkreślenie zasługuje, zachował swój charakter i podstawy w stanie niezmienionym. Wobec powyższego nasuwa się pytanie, czy oficjalne zdobycze i poziom sprawy języka międzynarodowego Esperanto, w krajach przodujących świata, osiągnął to znaczenie, na jakie całkowicie zasługuje? Innemi słowy czy już, względnie kiedy zatem Esperanto zwycięży? Na pierwszą część pytania należy niestety odpowiedzieć negatywnie. Esperanto jeszcze nie zwyciężył, mimo walki o swe prawa przez lat 40. Niewtajemniczonemu w istotę ruchu esperanckiego zdawać by się mogło, że sprawa widocznie jest na złej drodze i nie rokuje powodzenia. Na szczęście tak nie jest. Przeciwnie, to właśnie należy podkreślić, że w ciągu lat 40, mimo braku poparcia ze strony możnych tego świata i choć tak często zwalczany, Esperanto nie zamarł, że nie podzielił losu innych, bezmała 200 projektów języka międzynarodowego, które nie wykazały zdolności do życia, podczas gdy Esperanto od chwili swego ukazania się w Warszawie w roku 1887 po dzień dzisiejszy stale rozwija się wewnątrznie, terytorjalnie rozszerza, a liczbę swych zwolenników i znawców powiększa. Takiego rodzaju rozwój niema w sobie nic ze słomianego ognia, nie szerzy się żywiołowo, w zamian nie powoduje też nigdzie spustoszenia i, pośród wielu innych przejawów twórczo-cywilizacyjnych ducha ludzkiego, zapuszcza swoje korzenie, umacnia się w gruncie, rozwija systematycznie swoje łodygi, gałązki i liście, by w końcu, gdy życiowe warunki będą już po temu całkowicie odpowiednie, gdy czasy dojrzeją, by wtedy w pełni rozkwitnąć i wydać swe owoce w ogromnej mnogości, zdolnej całą ludzkość oddzielić. Na ten jednak wspaniały moment

ostateczny trzeba jeszcze długo poczekać. Okoliczność ta nawet nie powinna nas dziwić. Tak być musi i tak w odniesieniu do wielkich zjawisk społecznych w historii ludzkości zazwyczaj bywało.

Wystarczy wymienić chrystjanizm, który przez trzy stulecia w ciężkich warunkach rozwijał się i umacniał, nim nareszcie zwyciężył. Zato zwycięstwo jego było ogromne, prędkie i powszechne. Ówczesne czynniki polityczne pogańskiego Rzymu dostrzegły, że dłużej nie można ignorować tej potęgi moralnej i liczbowej, jaką reprezentowali ówczesni chrześcijanie, że celem obrony własnych zagrożonych interesów państwowo-politycznych, koniecznym jest przeważenie szali, mocą najwyższego autorytetu państwowego, na stronę chrystjanizmu.

Analogicznie ułożą się stosunki w świecie w sprawie oficjalnego przyjęcia Esperanta przez państwa polityczne. Rolę główną w tym względzie będą musiały odegrać naczelne państwa światowe, których wpływy ekonomiczne i polityczne nie zacieśniają się do własnych granic etnograficznych, ale sięgają daleko poza nie do obcych krajów i narodów. Takim państwem przedewszystkiem jest Anglja, a za nią i inne uposażone w dalekie i wielkie kolonie. Rozgrywające się obecnie wypadki w Chinach uwidaczniają, że dorobek kulturalno-materjalny Europy chińczycy coraz bardziej przyswajają sobie i toczą walki orężne metodami europejskimi, z drugiej zaś strony dążą chińczycy do wyparcia wpływów kolonizatorskich rasy białej w szczególności anglików, w czem popiera Chiny zasadniczy wróg polityczny Anglji na terenie Azji, dawniejsza Rosja a obecna Sowdepja. U podstawy tego zatargu azjatyckiego leży także kwestja językowa i wszystkie z niej płynące konsekwencje. Naród chiński liczący 400 milionów głów, mający poza sobą 4000 lat historycznej kultury, posiadający największą ze wszystkich narodów świata literaturę, widzi się obecnie nie tylko materjalnie wyzyskiwanym przez przedstawicieli rasy białej, ale widzi się nawet językowo krzywdzonym, bo całe wyższe życie ekonomiczne i kulturalne uzależnione jest od wpływów angielskich częściowo francuskich z krzywdą i szkodą języka chińskiego, który w dodatku, jako historycznie obciążony skomplikowaną pisownią, z trudnością opiera się obcym językowym wpływom. Nadto chińczycy obudzili się już ze swej historycznej drzemki i analogicznie jak japończycy zechcą przyswoić sobie zdobycze kulturalne Europy. Wytwarza się więc zawikłana a pełna sprzeczności sytuacja polityczna, kulturalna i językowa, oczekująca swego rozwiązania. Jakież tu może być rozwiązanie? Narody azjatyckie nie staną do współpracy kulturalnej i ekonomicznej z rasą białą w poziomie języka angielskiego lub francuskiego. Przeciwnie przed ich penetracją się bronią. Z drugiej strony narody azjatyckie chcą wkroczyć i przyswoić sobie zdobycze cywilizacji europejskiej. Nadto chcą zdobyć, że się tak wyrażę, obywatelskie równouprawnienie, którego dziś nie

mają w świecie. Chcą stać na jednym zasadniczo równym poziomie z rasą białą w dziedzinie językowej. Zapytuję więc, jaki czynnik kulturalny będzie środkiem rozwiązującym te sprzeczności? Czy coraz doskonalsza sieć kolejowa, czy ciągle wzrastająca handlowa marynarka, czy sieć drutów telegraficznych, oplatająca świat cały, czy genialne radio, lotnictwo czy automobilizm? Żaden z tych środków! Jedynie język Esperanto, jako neutralny dla wszystkich narodów świata, jako łatwo dostępny dla wszystkich ludzi, nawet kulturalnie niezaawansowanych, jako język pomocniczy obok utrzymanego języka ojczystego, nie czyniący mu żadnej krzywdy a często świadczący doniosłą pomoc — ten tylko język może przyczynić się do złączenia i wyrównania różnic dziś istniejących między rasami i narodami.

Świat anglo-saski już dziś jest zaniepokojony ekonomicznymi stratami, jakich doznaje na rynkach azjatyckich. Dla niego są one warunkiem bytu ekonomicznego a w konsekwencji i politycznego. Gdy zatem do świadomości kierowniczych sfer politycznych dotrze to smutne przeświadczenie, że obudzony duch narodów Azji stawia zaporę dalszej penetracji języka angielskiego czy francuskiego i utrudnia dalsze ciągnięcie zysków na tamtejszych rynkach przedstawicielom Europy i Ameryki, natenczas wśród wielkich panów polityków wyłoni się kompromisowa koncepcja, uprawniająca językowo rasę białą w Azji, a narody azjatyckie wśród przedstawicieli rasy białej. Wtedy to Esperanto uzyska całą potęgę poparcia państw politycznych i ta dopiero chwila będzie datą oficjalnego zwycięstwa Esperanta.

*Dr. Jan Mędrkiewicz.*



## I O M P R I M A L N O V A D A N Z I G .

Interese estas ekkoni iom la historion kaj la plej valorajn monumentojn de la urbo, en kiu baldaŭ okazos la kongreso de la verda stelo. Legendoj rakontas, ke Danzig estis fondita de Wyzimir, nepo de Lech, prapatro de Lechidoj-Poloj. Depost la tempoj de la reĝo Bolesław la Granda Danzig kune kun Apudmara Lando (Pomorze), kiu tiam enhavis ankaŭ Stettin kaj la insulon Rugja, apartenis al Polujo. Johano Kosmas de Praha, en la jaro 1000 nomas »Gyddanize« pola lim-urbo. Poste regis tiun landon wojewodoj, kies estreco ŝanĝiĝis je princa, pli aŭ malpli dependa de la polaj reĝoj. Princo Świętopelk venigis en j. 1227 al Danzig la monaĥojn Dominikanojn

kaj iniciatis la ĝis nun ekzistantajn foirojn en la tago de S-ta Dominiko. Post la morto de la lasta princo Mestwin II. ekregis tie la reĝo Przemyslaw kaj post li Władysław Lokietek. Estante okupita en aliaj partoj de la lando li venigis la Kruckavalirojn kontraŭ Waldemar II. de Brandeburgio, kiu minacis al Danzig. Ili okupis Danzig kaj Pomorze. La urbon ili ekposedis per ruzo kaj faris en ĝi teruran buĉadon, kies rememoro vivas ankoraŭ ĝis nun en la popolaj kantoj de Kaŝuboj. Sub la regado de Krucistoj Danzig prosperis dum la majstro Winrich de Kniprode, tamen baldaŭ komencis periodo de subpremado kaj limigado de libereco, pri kiuj rakontas senpartiaj germanaj fontoj. La Grandmajstro Konrad Wallenrod fondis eĉ en j. 1390 apartan Novan Urbon kaj donis al ĝi privilegiojn por subfosi la signifon de Danzig. La plej nuba periodo de regado de Kruckavaliroj ckestis post la batalo apud Grunwald (Tannenberg) en j. 1410. La komturo Ulrich von Plauen antaŭ Pasko inside ordonis murdi en la Danziga kastelo la urbestrojn Konradon von Letzkau kaj Arnoldon Hecht kaj la konsilanon B. Gross kaj iliajn korpojn ĵeti en sterkon. Oni entombigis ilin poste en la Maria preĝejo. Danzig aliĝis poste al la insurekcio kontraŭ la Kruckavaliroj kaj en j. 1454 konkiris kaj detruis ilian kastelon senpostesigne. Dum la tuta milito por aligo de Pomorze al Polujo la plej grandajn oferojn portis Danzig, sed estis vere reĝe donacita de Kazimir Jagellono en »Privilegium Casimirianum«, kiu donis al ĝi la plej grandajn avantaĝojn, kiajn oni nur povis imagi. Dum la regado de Kruckavaliroj Toruń, kuŝanta ĉe la tiama pola limo disvolviĝis kaj riĉiĝis danke al tio, ke ĝi estis komerca ĉefpunkto inter Polujo kaj Okcidento; post la reveno de Pomorze al Polujo ĝian lokon ekposedis Danzig. El profundo de Polujo sur Vistulo, kiu kune kun siaj flankriveroj trafluas la tutan landon, oni venigadis al Danzig grenon, lignon por la konstruado de la ŝipoj, linon, kanabon k. t. p.; interŝanĝe Danzig liveris al la lando produktojn de artindustrio, kiuj tiam estis modaj tiel, ke hodiaŭ la plej grandiozajn artobjektojn oni devas serĉi ne en Danzig sed en Polujo.

Dum kelkjarcenta regado pola nur unufoje la urbo kontraŭstaris la reĝon, nome kontraŭ Stefan Batory, timante limigon de l' privilegioj, tamen baldaŭ ĝiaj reprezentantoj surgenuis petis la pardonon de l' reĝo. Ekzemplojn de neŝancebla kaj senlime oferema fideleco por Polujo donis Danzig dum la svedaj militoj, kio elvokas des pli grandan admiron, ke plimulto da Danziganoj estis evangelianoj kaj la Svedoj proklamis, ke ili batalas en la nomo de tiu konfeso. Rimarkinda estas la fideleco de Danzig al la reĝo Stanislaw Leszczyński kontraŭulo de Aŭgust la Saksa, kiu kaŭzis al la urbo sennombrajn perdojn. La tempoj de disdivido de Polujo estis por Danzig ankaŭ malĝojaj. Detranĉita dum la unua divido de Polujo en j. 1773 pro okupo de Pomorze flanke de Prusujo Danzig restis fidela al Polujo malgraŭ

la fera ringo de prusa impostlimo, kaj falis nur pro tio, ke ĝi ne volis propravole submetiĝi. Pri la agordo, kiu tiam regis en la malfeliĉa urbo, bone atestas la memoraĵoj de Johanna Schopenhauer, la patrino de l' granda filozofo, kiu kune kun la edzo forlasis Danzigon kelkajn horojn antaŭ la eniro de prusa militistaro, ne volante simile al multaj aliaj, vivi en la urbo, kiu perdis sian republikanan liberecon. Ankaŭ la fama artisto Daniel Chodowiecki, naskiĝinta en Danzig, kiu pro gajno transloĝiĝis Berlinon kaj en j. 1773 vojaĝis Danzigon por viziti la familion, atestas pri la sentoj de Danziganoj al Polujo. Post disigo de Polujo la urbo senigite de vivigaj fontoj falis en la vicon de triagradaj provincaj lokoj, kaj hodiaŭ Gdynia, kiu en la momento de ekposedo de la marbordo per Polujo estis vilaĝo kun dekelkaj dometoj, kreskas kun rapideco de amerikanaj urboj, kio tute por Danzig ne estas profita.

Ŝatante de antikvaj memoraĵoj trovas en Danzig multajn grandiozajn monumentojn de arto kaj arkitekturo. De la romanaj monumentoj restis nur partoj de internaĵoj en la preĝejo en Oliwa kaj de S-ta Nikolao en Danzig. La gota arkitekturo estas parto de brika konstrumaniero, kiu vidigas en la tuta Polujo kaj tiuj partoj de hodiaŭa Germanujo, kiuj estis iam enloĝataj de Slavoj. Kiam la gota stilo povis tiel la internan kiel ankaŭ la eksteran flankon de konstruaĵo riĉe ornami per skulptaĵoj, la brika gotstilo devis limiĝi al ornamado de la muroj per substrekado de konkavaĵoj kaj konveksoj; tio estas la kaŭzo de multaj kavaĵoj, ornamentaj zonoj brikaĵ, vertikalaj ripoj k. t. p. En la tuta Pomorze oni rimarkas la deziron doni al la muroj multkolorcon, kiun oni atingis kovrante la kavaĵojn per kalktavolo forte kontrastanta kun la fono de ruĝa briko. Belegaj ornamoj de diverskolora poluritaj brikoj, kiuj tiel riĉe estis enkondukitaj en la preĝejo de S-ta Jakobo en Toruń, estis nur parte aplikitaj.

Ekstrema ĉarma konstruaĵo en Danzig estas la Granda Muelejo, konstruita en j. 1349 de la Kruckavaliroj, donacita al la urbo de Kazimierz Jagellono, tre interesa pro tio, ke ĝi ĝis nun funkcias movata kiel iam per la rivereto Radunia. Grandioza estas la Malliberula Turo konstruita en j. 1346 kiel fortikaĵo en la urbomuroj, ŝanĝita poste je malliberejo, kovrita per belega tegmento en la stilo de nederlanda renaskiĝo en j. 1587. Apud ĝi troviĝas la Ekzekutejo, rekonstruita en j. 1576 en la sama stilo, riĉe ornamita per skulptaĵoj, kaj la malfrugota Pafejo de S-ta Georgo el j. 1494. Proksime oni rimarkas ŝtonkonstruitan iaman pordegon nomatan Alta pro tio, ke ĝi kondukas al monteta ĉirkaŭaĵo, kiam la kontraŭa pordego kondukanta al la apudvistula ebenaĵo, ricevis la nomon Malalta. La Altan pordegon konstruis en j. 1588 Wilhelm von dem Blocke laŭ la Berchem'a pordego en Antverpen, kiu prenis ekzemplon de la pordoj de Veniza arkitekturisto Michele Sanmicheli, similaj al la romaj triumfaj arkoj. La mal-

supera parto de la danziga pordego ornamita per rustiko kun konkave skulptita branĉeto sur ĉiu ŝtono. Sur la supra frizo aperas grandiozaj blazonoj de Polujo, Pola Pomorze kaj Danzig.

Trairinte la suprenomitajn konstruaĵojn al la urbo oni ekvidas la pordon de la Longa strato. Iam ĝi estis gota en la muroj, kiuj per malpli larĝa zono ĉirkaŭis la iaman urbon. Kiam ĝi perdis sian antaŭan signifon, oni anstataŭis ĝin en j. 1614 per alia, ĝis nun ekzistanta, pure ornama, en la stilo de malfrua itala renaskiĝo kun flandraj aliigoj. Desub la arkaĵoj de tiu pordego montriĝas belega perspektivo al la Longa strato, iom kurbiĝanta, sur kies fino aperas ĉarma urbodomo kun malpeza, gracia tureto. Ankoraŭ hodiaŭ tiu strato konservis sufiĉe grandan nombron da malnovaj domoj. Iam, kiam antaŭ ĉiu domo etendiĝis terasoj similaj al tiuj, kiuj konserviĝis en la najbareco de Maria preĝejo, la perspektivo estis tiel ĉarma, kiel ĝin prezentas en siaj desegnaĵoj Chodowiecki. La urbodomon oni rekonstruis el gota kaj la turon kovris per belega kupra kiraso en la speco, kiun kreis la flandra renaskiĝo. En ĝia supro, simile al la preĝejo de S-ta Katerino aranĝita estas la sonorilmuziko. En la urbodomo la plej bela estas la Ruĝa ĉambrego de konsiloj, rememoriganta la plej ĉarmajn internaĵojn de italaj palacoj de malfrua renaskiĝo. Al tiu ĉambrego kondukas riĉe lignoskulptita pordo kun granda pola aglo surhavanta la blazonon de la reĝo Johano Sobieski. En la ĉambrego iom kaŝite denove aperas la pola aglo ligneskulptita. En la najbara malpli granda ĉambro oni renkontas la aglon kun la blazono de Henriko Valois, reĝo de Polujo kaj Francujo (Henriko III.), kaj en la tuta urbodomo estas multe da interesaj memorajoj el la polaj tempoj, ekz. la horloĝo donacita de la reĝo Stanislaw Leszczyński. Iam la grandan, t. n. Blankan ĉambron ornamis la portretoj de la polaj reĝoj, de kiuj la plej bela estis tiu de Wladyslaw IV., pentrita de la fama danziga majstro Daniel Schulz.

Malantaŭ la urbodomo ĉe la Longa Foirejo staras la Artuskorto, iama sidejo de societoj de riĉaj urbanoj, ŝanĝita en j. 1742 je grenborso. Sur la pordego troviĝas skulptitaj brustbildoj de la reĝoj Zygmunt III. kaj Wladislaw IV. Nun oni eniras tien tra la najbara domo, kies vestiblon ornamis per danzigaj antikvaĵoj konata kolektanto Gieldziński. La interno de Artuskorto formas unu ĉambregon apogitan je kvar granitaj kolonoj subtenantaj palmoforman arkaĵon. Ĉiu societo, kiu tie ekzistis, ornamis laŭ sia plaĉo sian lokon, kaj de tio formiĝis surpriza diverseco de mebloj. Oni vidas tie tre malnovan bildon prezentantan la konkiron de Malborg de Kazimir Jagellono kune kun la danzigaj helpmilitistoj, bildon de Orfeus verko de Johano Fredeman de Vries el Leeward, fama pro siaj eldonajo de bildoj de nederlanda renaskiĝo, la bildon de la Lasta Juĝo de Anton Möller, nomata »la pentristo de Danzig«, marmoran statuon de la reĝo

August III. portreton de Stanislaw August k. t. p. Intereson vekas malgrandaj modeloj de ŝipoj pendigitaj sub la plafono. Rimarkindaĵo estas forno alta je 12 m. de kolore poluritaj kaheloj devenanta el j. 1546.

Antaŭ la Artuskorto staras puto kun la bronza statuo de Neptuno, la verko de Adrijan de Vries el j. 1620. Sur la ĉirkaŭanta ĝin fera krado devenanta el j. 1634 troviĝas polaj kaj danzigaj blazonoj.

La Longan Foirejon fermas La Verda pordego, kiu estis domo konstruita por la polaj reĝoj kaj samtempe pordo kondukanta al Mottlau la flankrivero de Vistulo, kiu formas en Danzig internan havenon. Konstruis ĝin Johano Kramer en j. 1564 en tipa stilo de nederlanda renaskiĝo kun certa aldono de itala ornamarto. La sama Kramer konstruis en j. 1569 la Anglan domon, la plej grandan privatan domon en Danzig.

En la stilo de nederlanda renaskiĝo estas la urbodomo de Malnova Urbo, la verko de Anton von Obbergen el j. 1589 interesa pro tio, ke simile, al kelkaj nederlandaj domoj, la fenestroj de l' teretaĝo ne respondas al la fenestroj de la supra etaĝo, kion oni rimarkas ankaŭ en la Armilejo, ekstreme originala konstruaĵo de la sama majstro.

De la Verda Ponto sur Mottlau grandioze prezentiĝas la granda levilo havena konstruita en j. 1411, pro kiu komenciĝis la malpaco de la urbo kun la Kruckavaliroj, kiu alkondukis al la supremenciita krima mortigo de la urbestroj. Inter la brakoj de Mottlau kuŝas la Insulo de Grenejoj, sur kiu la pli malnovaj gernejoj memoras la polajn tempojn, kiam oni tie metis la grenon venigatan el la profundo de l' lando. La plej karakterizaj estas la Ansera Kolo de j. ĉ. 1400 kaj la „Reĝa grenejo“.

La privataj domoj en Danzig laŭ la norda kutimo havis larĝon de nur du aŭ tri fenestroj, sed alton de tri aŭ eĉ kvar etaĝoj, kun krutaj tegmentoj kaj altaj teretaĝoj, en kiuj troviĝis granda vestiblo. Tiujn mezepokajn dimensiojn konservis la domoj ankaŭ, kiam el Nederlando venis la stilo de renaskiĝo en la speco flandra aŭ itala-franca. La plej bela specimeno de malfrua itala renaskiĝo estas la domo konstruita en jaro 1618 de Johano Speyman la urbestro, kiu fariĝis fama per tio, ke dum malsato en Italujo sendis tien grandan ŝiparon kun la greno. De la posteaj posedantoj devenas la nomo de Domo de Steffens. Fama danziga skulptisto Andreo Schlüter la Maljuna en la domo por si konstruita en j. 1640 kunigis motivojn nederlandajn kun italaj kaj kreis tuton, kiu fariĝis tipa por la stilo de la domoj en Danzig.

La plej grandioza preĝejo en Danzig estas la Maria konstruita en jaro 1402—1502 longa je 105 m. larĝa je 66 m., kun potenco, nefinita turo alta je 78 m. Same ĝia ekstero kiel ankaŭ la interno faras imponan impreson pro sia simpleco kaj potenco. Interne konserviĝis multe da valoraj antikvaĵoj, kiel la triptiko de la Lasta Juĝo, unu el la plej bonaj verkoj

de Johano Memling, la triptiko skulptita en j. 1515 de Mihaelo Schwarz de Augsburg, granda horloĝo astronomia, la verko de Johano Düringer el j. 1470 kaj la fama kolekto da liturgiaj vestoj, inter kiuj la plej malnovaj teksaĵoj devenas de la XII jc.

Malpli granda, sed ne malpli interesa estas la preĝejoj de S-ta Katarino, de S-ta Triunuo kun la kapelo de S-ta Anna, de S-ta Johano kun potenca turo, de S-ta Nikolao kun multaj polaj toboŝtonoj kaj la lasta de la gotaj, tiu de S-taj Petro kaj Paŭlo.

La renaskiĝo postlasis neniam monumentojn en la preĝejoj konstruaj, ĉar tiam kun la reformacio malfortiĝis la fervoro al konstruado de novaj preĝejoj, kaj la baroko donis nur la Reĝan Kapelon, nomitan tiel je la honoro de Johano Sobieski, kiu kune kun la primato Olszowski subtenis ĝian konstruadon. Tiun kapelon ornamas la skulptaĵoj de Andreo Schlüter la pli Juna.

El artindustrio en Danzig plej altan nivelon atingis la orajista, bronza kaj lignajista, kaj la monfarejo, gravur- kaj presarto famiĝis per vico da unuarangaj verkoj.

Belan muzeon de artaj antikvaĵoj posedas Danzig en la postfranciskana monaĥejo.

*P-o Dro Tadeusz Kruszyński.*



M. DUNIN-BARTODZIEJSKI

## KIEL LARMO

*Malgaja kiel larmo kaj tiel serena,  
Kiel revo senkulpa de eta infano,  
Kvazaŭ temo prenita el mira romano,  
Tiel strange fabela kaj tiel edena...*

*Kiel floro kreskanta sur tombo ĉagrena,  
Kiel ie en arboj kaŝita kabano...  
Kiel lasta adiaŭ ŝvingita per mano —  
Amo mia eliris el sopir' gehena.*

*Pura — kiel lilio — en koton jetita,  
Kiel astro brilanta el sfero zenita  
Sur la teron falinta en sablon sen varmo.*

*Kiel lasta ekbrilo de ruĝa krepusko,  
Kiel birdo kaptita en fera embusko,  
Kaj malgaja, malgaja sen fin' — kiel larmo.*

STANISŁAW BRAUN.



## JAPANAJ UTOJ

*Amo havas cent okulojn,  
Sed nenion vidas,  
Tial ĝi rimarkas nulon  
Kvankam havas cent okulojn...*

*Blinda sorto aman brulon  
Plej ofte mokridas —  
Amo havas cent okulojn,  
Sed nenion vidas.*

*Saĝo ĉiun refreŝigas  
Kvazaŭ akvo bona  
La animon varmetigas,  
Saĝo ĉiun refreŝigas...*

*Do ĝin trinku, ĝi bonigas  
Kaj estas bezona —  
Saĝo ĉiun refreŝigas  
Kvazaŭ akvo bona.*

*Kun permeso de l'aŭtoro tradukis Ilo*

R. KWIAŦKOWSKI.



WŁADYSŁAW ST. REYMONT.

## SUPER LA ABISMO.

(DAURIGO).

Ili parolis unu post la alia kaj la akraj vortoj faladis je li kiel ŝtonoj, ke li retirigis sub tiu hajlo mortiga.

— Sendu gvardiojn! — Li ekflustris.

— Ili perfidos! Ne rompos. Tie oceano leviĝis kaj frakasas ĉiujn diĝojn! La mond' renversigas!

— Ve al ni, ve!

— Kion do fari? — li demandis senhelpe.

Bregu tremigis la murojn. Ekŝutiĝis la frakasitaj fenestrovitroj, malvarma vento enfalis en la salonon, ke la reĝaj portretoj ekŝanceliĝis.

— La momento de juĝo kaj puno proksimiĝas! — ekĝemis iu.

Peza silento falis kiel tomba plato.

— Timuloj kaj sklavoĵoj! Al ekzekutisto Vin transdoni. For!

Tamen neniuekmoviĝis, nur la okuloj ekbrilis minace, kunpremiĝis la pugnoj kaj la buŝojn kurbigis timo.

— Parolu, ĉar mi frezeziĝus!

Ili sidis mutaj, kvazaŭ subite mortintaj.

Li rigardis ilin per okuloj de malŝato kaj malamego.

— Timo vin tremigas, malnobla, fia timo — li flustris insulte. —

Mi ankaŭ vidis la morton de senkulpuloj. Vidis, kiel iris al la morto justuloj... aŭdis triumfan kanton de mortigatoj! Kaj ekzekutisto ili min nomis! Ekzekutisto! — Li vokis per voĉo de malespero. Tie mi komprenis ĉion, tie al la vero mi enrigardis en la okulojn, tie la unuan fojon en

la vivo vidis la homojn... Kaj nun mi scias, kion fari, scias. Nu do kadavroj, leviĝu. Sufiĉe jam da sango, sufiĉe da bataloj kaj larmoj... Oni frapu la sonorilojn, la heroldoj proklamam, ke mi donas ĉion al tiuj, kiuj estas ĉio. Mi tion volas! ĉu vi aŭdas!

La konsilantaro saltleviĝis, ĉar denove ektondris la kanonoj, la kugloj ŝutiĝis al la muroj kiel hajlo, kaj grandega krio de l'batalo blovis tra la salono sovaĝan, teruran uraganon.

— Pli rapide! Proklamam mian volon. Rapidu! — Li kriis flame.

— Tro malfrue!

— Tro malfrue!

Ili ripetadis malgaje ĉirkaŭante lin.

— Sur la ponto daŭras la batalo!

— Ne plu estas forkuro, nek savo!

— Ni pereos. Oni disŝiros nin! — ili ĝemis premante sin ĉirkaŭ li.

Mi iras renkonten kaj mem proklamos al ili la libereco! — Li ekkriis ĵetante sin al la pordo.

— Ci ne eliros sen ni!

Oni ekmuĝis ĉirkaŭante lin per densaĵo da nudigitaj spadoj kaj sovaĝaj vizaĝoj.

— Ci volas doni nin al la venĝo!

— Kaj per ni aĉeti cian vivon!

— Ne, ne, ci estas nia ŝildo kaj garantiulo!

Cent manoj kaptis lin, ĵetante malproksimen de la pordo, kiu krake fermiĝis malantaŭ li. Li devis subiĝi al perforto.

Li estis malliberigita en sia kastelo, en sia tronsalono.

Longe ne povis kompreni, kio okazis kun li.

— Ili fermis lin kiel malbonan, malutilan beston! Lin! Ili! Ili, kiujn li levis de nenieco! kiuj estis lia eĥo; lia ombro...

La mond' abismiĝis kun li, kvazaŭ en la fundo de l' haoso.

— Kie mi estas! Kie? — Li kriis rigardante duonfreneze.

Li estis sola en malplena, grandega salono, la lumoj estingiĝis, nur en la sangaj fajrobriloj vidiĝis de la portretoj la kapoj de l' praavoj, blankiĝis la vizaĝoj fantome kaj briletis severe la okuloj, armiloj kaj kronoj.

Ili alrigardis lin per glacaj okuloj de l' abismo.

Staris fieraj, grandiozaj, kvazaŭ horo da dioj senmortaj.

Jen tiu, kiu sur la amasoj da kadavroj fiksas la tronon de l' praavoj.

Jen, kiu la popolojn ligis en gardojn de mallibero kaj premis per fera piedo.

Jen, kiun ĉiu futo de tero malbenegis.

Jen vico da kvietaj kaj bonaj, kies nomoj estis nur sono vanta.

Kaj jen tiu la plej granda, kiu la tutan mondon rabe konkiris sub sian potencon kaj la tutan gloron prenis sur la tempiojn...

Jacentoj formortintaj, potenco mortintaj, triumfoj kadavraj, gloroj fantomaj, agoj forgesitaj, ombroj vantaj, neniecoj... alrigardis lin de la oraj kadroj per ia moka, stranga rigardo.

Vent'ekblovis tra la malhela salono, kaj ekmoviĝis iliaj sceptroj, eksusuris la manteloj, ekstremis la kronoj kaj ili komencis ŝanceliĝi, moviĝi kaj kvazaŭ malsupreniri de la toloj kaj iri al li malrapide senfina vico da fantomoj silentaj...

Li retiriĝis terurigite, sed ili iris konstante kvazaŭ trae tra li, iris funebraj, kaj ĉiu rigardis en lian vizaĝon per malplenaj okulkavoj kaj flustris:

— Mort'! Mort'! Mort'!

Li ĵetis sin subite kaj blinde al la ĉefa pordo.

Fermita.

— Servistoj! — Li ekkriis ŝirante la bronzaĵn ansojn.

Neniu aperis.

Li kuris al alia pordo — estis ferita.

Lasta, sekreta, kaŝita malantaŭ la speguloj, same.

Li ekŝiris ĝin tutforte, frapis per la piedoj, kriis kaj petis.

Ĝi ne lasis, neniu aŭdis liajn petegojn.

Freneziga timo lin skuis, do mil fojojn li trakuris la salonon, frapis la murojn per pugnoj, ŝiris la bronzon, kriis, petis, minacis eĉ — vane, nur la eĥoj de liaj propraj krioj aŭdiĝis en la krepuskoj. (daŭrigota).



# ESPERANTISTA MOVADO.

## KRONIKA ZAGRANICZNA.

Ostatni miesiąc przyniósł kilka ważnych sukcesów naszemu ruchowi. Z braku miejsca w numerze tym omówimy tylko: »Międzynarodową Konferencję wychowania« (patrz niżej artykuł Dra Czubyńskiego) oraz Zjazd Międzynarodowej Unji Radjofonicznej.

Odbył się on w Lausanne (Szwajcaria) w dniach od 11—13 maja. Na wniosek stacji radjowej w Geneve (Genewa) uchwalono na posiedzeniu dnia 12 maja jednogłośnie:

»Międzynarodowa Unja Radjofoniczna poleca stacjom, ażeby uczyniły próbę stałemi nadawaniami w esperancie raz w tygodniu przez 10—15 minut zapowiedzi odległym słuchaczom głównych punktów swojego tygodniowego programu, albo ażeby zaznajamiały ich z wydarzeniami artystycznymi, umysłowemi czy ekonomicznymi swego narodowego życia. Unja zaleca zarazem stacjom, aby codziennie zapowiadały po esperancku swój program wieczorny«.

Utworzonej specjalnie »Komisji dla duchowego i artystycznego zbliżenia« powierzono udzielać stacjom wszelkich potrzebnych wskazówek dla urzeczywistnienia tej uchwały. Od »Polskiego Radja« w Krakowie, Poznaniu i Warszawie oczekujemy dalszych kroków w tym kierunku. Ze swej strony gotowi jesteśmy do współpracy i jak najdalej idącej pomocy. *Sław.*

## MIĘDZYNARODOWA KONFERENCJA WYCHOWANIA.

W dniach 16—20 kwietnia 1927 odbyła się w Pradze międzynarodowa konferencja wychowania pacyfistycznego pod hasłem »Pokój przez szkołę«. Protektorem jej był prezydent Rzeczypospolitej czechosłowackiej T. G. Masaryk, honorowymi prezesami Dr. Ed. Beneš, minister spraw zagranicznych i Dr. M. Hodža, minister Oświecenia. W konferencji brało udział okragło 400 uczestników, z tego 128 cudzoziemców przedstawiających 18 narodowości. Z Polski byli: p. Helena Radlińska, p. poseł Wł. Łypacewicz, Dr. Antoni Czubyński. Wszyscy z Warszawy. Nadto dwóch Polaków ze Śląska czeskiego. Językami konferencji były: czeski, niemiecki, francuski, angielski, esperancki i polski. Głównym językiem, na który były tłómaczone wszystkie referaty, o ile w nim ich nie wygłoszono, był język esperancki. Wiele referatów wygłaszano wyłącznie w nim. Była to jak się zdaje pierwsza konferencja międzynarodowa, gdzie język ten odgrywał rolę łącznika między uczonymi różnych krajów, którzy zjechali się wcale nie dla jego propagandy, ale dla roztrząsania zagadnień wychowawczych, posługując się nim tylko jako środkiem. Dwa dni przed właściwemi obradami poświęcili esperantyści, którzy się tutaj znaleźli, na omówienie spraw poufno-organizacyjnych.

Dnia 19 kwietnia w środę odbyły się popołudniu posiedzenia komisyjne w osobnych salach, a wnioski tych posiedzeń zostały nazajutrz odczytane na zebraniu plenarnem i przekazane prezydium do publikacji. Wniosków tych nie podaję, gdyż miały ulec jeszcze redakcyjnym zmianom.

Ogólną myślą podstawową wszystkich referatów był pogląd, iż drobne na pozór zdarzenia w życiu dziecka mogą zaważyć, czy rozwinie ono w sobie

instynkty szlachetne czy zbrodnicze. Pedagogika pacyfistyczna powinna rozwijać owe instynkty w kierunku solidarności bliźnich i narodów.

Esperanckie referaty wygłosili: Prof. Piotr Bovet z Genewy: »Zagadnienia wychowania pacyfistycznego na polu psychologii«; Prof. Friedrich z Brna: »Ankieta w sprawie uczuć dziecka«; Prudhommeaux z Paryża i Dr. Möbusch z Lubeki: »Walka z podręcznikami szkolnemi w duchu wojennym«; nadto kilka innych mniej ważnych.

*Dr. Antoni Czubryński.*

## UNUA RADIO - EKSPOZICIO EN KRAKÓW.

En la tagoj de 24/IV—8/V okazis en Kraków la I. radio-ekspozicio, partopenita ankaŭ de aliurbaj kaj kelkaj eksterlandaj firmoj, aranĝita de la Sindikato de Ĵurnalistoj de Kraków.

La esperantistaj radianoj de Kraków profitis la okazon kaj aranĝis en la ĉefa ekspozicia halo grandan standon: 12 m<sup>2</sup> tabulego surhavis frapantajn surskribojn pri Radio kaj Esperanto, i. a. liston de 28 ŝtatoj, kiuj jam enkondukis Esperanton en sian radio-programon s. t. „Pollando je la 29-a loko!“, la konatajn opiniojn pri E. de Ostwald, Richet, Painlevé, Margueritte, Max Müller, Lange k. a. eminentuloj kaj ĉe granda tablo lernolibroj kaj aliaj esperantaĵoj estis vendataj de la deĵorantoj.

Nia aprila N-o kaŭze de tiu ekspozicio grandaparte dediĉita al Radio estis ankaŭ ekspozita kaj vendata.

Sur la tablo kuŝis petoskribo al la krakova Radiostacio pri tio, ke Esp. estu disaŭdigata el Kraków. La petoskribon subskribis ĉ. 500 personoj.

La oficiala gvidlibro tra la ekspozicio enhavas en Esperanto redaktitan artikoleon: „Ni salutas vin, radianoj!“ kaj pollingvan artikolon de Dr. Leopold Dreher s. t.: „Międzynarodowy język radjowy“. La loka gazetaro menciis favore la esperantan standon. Entute fariĝis bona propagando.

\* \* \*

En la No 20 de „Radjo“ (Warszawa) troviĝas artikoleto, subskribita de Dr. L. D., titolita: „O język radjowy“, en kiu la verkinto pledas por nia lingvo. Li petas la legantojn de „Radjo“ skribi al la redakcio de la gazeto siajn opiniojn pri la afero kaj speciale pri tio, kiu lingvo devas elektiĝi kiel internacia radio-lingvo.

Niaj samideanoj nepre partoprenu do en tiu kvazaŭa enketado kaj skribu amase al la red. de „Radjo“ pri la preferindaĵoj de Esperanto.

## P O L L A N D A K R O N I K O .

BYDGOSZCZ. La loka societo Esperanto depost unu monato vigle eklaboris. Regulaj kunvenoj okazas ĉiulunde je 8-a en la Komerca Resurso, Jagiellońska 25; societadreso estas: Kościuszki 5 (adreso de prez. s-o Hinc). La 11-an de aprilo okazis funebra Zamenhof-vespero, la 19-an

okazis publika propagandvespero kun interesa prelego de prof. S. Krasicki pri la temo »Nuna stato de Esperanta Movado«. Krom tio 13-jara artisto Viki Winterfeld violonludis kaj baritonisto s-o Wojnowski prezentis grandsukcese 3 esperantajn kantojn. La vesperon ĉeestis 300 per-

sonoj. Komenciĝis kurso kun 50 pers.; krom tio aliĝis al la societo 30 novaj membroj. Pri la vespero kaj la kunigita libro-, gazet-, kaj korespondad-ekspozicio raportis ĉiuj lokaj gazetoj tre favore.

KATOWICE. La 23-an IV. dissendis la societo »Esperanto-Amikoj« cirkuleron pri la ekskurso al Cantorio, aranĝota de ĉeĥoslovakaj samideanoj la 8-an V. Dum la konversacia vespero, la 6-an V. anoncis sin al partopreno 11 gesamideanoj el Sosnowiec kaj 11 membroj de la societo. La ekskurson partoprenis entute 111 personoj diversnaciaj: Ĉeĥoj, Germanoj, Hungaroj, Poloj kaj Slovakoj; malgranda kongreseto ĝuis la rave belan tagon, la unuan en tiu ĉi printempo. Sur Cantorio la 8-an V. je la unua posttagmeze malfermis la laborkunsidon de U. E. A. delegitaro s-ano Krysta. Per koraj vortoj li salutis la ĉeestantojn kaj raportis pri la progresoj dum la tempo depost la lasta kunsido. S-ano Libberda donis ĝeneralan raporton pri la laboroj de »Paska konferenco« en Praha. Post admono je plua senlaca laborado s-ano Krysta dankis la partoprenatojn kaj esprimis la deziron, ke post la Universala Kongreso en Danzig ni aranĝu ekskurson al la Beskidoj, eble al Stoĵek, kaj invitu la gesamideanojn el Ĉeĥoslovakujo. Fermo de la laborkunsido je 3-a horo posttagmeze, poste komuna fotografado kaj amuza parto. Je la 4-a ni devis malsupreniri, la Ĉeĥoslovakaj samideanoj iris al Bystrzice kaj ni Poloj al Ustroń. La ekskurso faris je la publiko tre favoran impreson kaj estis bona propagandilo.

LUBLIN. Loka filio de P. E. A. surmurigis apud ĉefa strato Krakowskie Przedmieście belan, blankan vitroŝrankon kun konstante ŝanĝataj diversaj propagandaj afiŝoj kaj

aktualaĵoj pri Esperanto. La 22. V. Mezlerneja Junulara Sekcio ĉe P. E. A. faris posturban ekskurson en arbaron. Loka filio de Laborista Esp. Societo »Laboro« bone sukcesas en sia agado danke al la agado de s-ano Halpern, kiu lastatempe referatis pri »Deveno de lingvo« kaj »Esperanto kaj proletaro«.

KRAKÓW. La 12. V. k. j. okazis en Krakova Societo prelego de P-o D-o Odo Bujwid, kiu raportis pri siaj impresoj dum Konferenco de Pasteur'aj Institutoj, okazinta dum Pasko en Parizo. Skizinte mallonge la vivon kaj gravecon de inventoj de Pasteur kaj kleriginte populare la ecojn kaj la kontraŭbatalon de rabio, la preleganto transiris al la lingvo flanko de la Konferenco. Konstante, ke dum ĝi regis vera haoso pro kelkaj oficialaj lingvoj, kiuj devis esti tradukataj, kio rabis multe da tempo, la preleganto rimarkis, ke la Konferencon partoprenis nur 2 esperantistoj t. e. li kaj japana samideano P-o Kiji. La interkonatiĝo okazis hazarde dum ekskurso al Versailles, kie P-o Bujwid dum sia propagando de Esperanto inter la ĉeestantoj ekaŭdis la unuan esperantan vorton el la buŝo de japana samideano. La propagando vokis intereson inter la konferencanoj kaj certe kreis novajn adeptojn de nia movado. La prelegon partoprenis 30 personoj.

»Studenta Esperantista Rondo« (Akademickie Koło Esperantystów) aranĝos dum Pentekosto kune kun la s-anoj el Sosnowiec ekskurson al Ojów, kie okazos la »Amuza Kongreseto« de sudokcidenta Polujo. (vidu sub Ojów). Ĉiuj gesamideanoj babilemaj kaj bonhumoraj estas petataj partopreni. Detalaĵojn donas la estraro (M. Ziomek prez. aŭ T. Ho dakowski sekretario).

OJCÓW. Ĉiuj samideanoj estas petataj partopreni la ekskurson al Pola Svisujo — Ojów. Komuna ren-

konto okazos en Olkusz dum Pentekosto la 5. VI. je 5-a horo matene ĉe la stacidomo. Ekskurso 2-taga.

Krom laborkunsido en la programo estas amuzoj kaj propagando; nesamdeanoj estas ankaŭ invitataj.

## POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO.

**Estraro.** Ekzekutiva Komitato (adr. de Prezidanto):

Prez. Prof. Dr. O. Bujwid (Kraków Lubicz 34).

Vprez. Inĝ. E. Tor.

Gen. sekr.-kasisto J. Alfus (Kraków, XXII. Aleja Dembowskiego 10).

Fako de propag.-instr. Dr L. Dreher (Kraków, Starowiślna 37).

Fako de organ. Dr. L. Rosenstock (Kraków, Czysa 17).

**Celo:** Kunlaboro de libervole aliĝintaj grupoj en Pollando.

**Stato:** Ĝis la 15 de majo 1927 aliĝis:

1. Esperanta grupo de TUR en Borysław
2. Rondo esperantista en Przemyśl
3. Societo de Esperanto-Amikoj en Katowice
4. Esperantista grupo en Sieradz
5. Esperanta Societo en Lwów
6. Societo Esperanto en Bydgoszcz
7. Societo Esperanto en Kraków
8. Ligo Esperantista de Silezio en Król. Huta
9. Rondo Esperantista en K. Huta
10. Espero en Rozdzień

11. Rondo de fidelaj esp.-amikoj en Janów

12. Konkordo en Warszawa

13. Pola Esp. Asocio en Warszawa

14. Akad. Esp. Rondo ĉe Juda Hejmo en Warszawa

15. Pola Stud. Esperanto Soc. en Warszawa.

**Kotizo:** 5 gr. monate por ĉiu grupano. La grupoj ne aliĝintaj ankoraŭ aŭ ne pagintaj la kotizon bonvolu aliĝi senprokraste resp. pagi al la kasisto.

**Organizado:** Laŭ la decido de la Ekz. Kom. ĉiu grupo devas komunikadi ĉiufoje pri la ŝanĝoj en la nombro de sia membraro.

Estas preparata organizo laŭstatuta de la distriktaj organoj de P. E. D. Tiucele la grupoj sidantaj en la vojevodaj urboj estas komisiataj kunvoki plej malfrue ĝis la 15 de junio distriktajn konferencojn de grupdelegitoj en ĉiu vojevoda distrikto por elekto laŭstatuta de la distriktestraro.

Laŭ la statuto la tempo, loko kaj tagordo de la konferenco devas esti komunikata al la sekretario de Ekzekutiva Komitato.

Kraków, 15. de majo 1927.

Por Ekzekutiva Komitato:

*Odo Bujwid, prez.*

*J. Alfus, ĝen. sekr.*



# ADMINISTRACIAJ SCIIGOJ.

## I. GARANTIA FONDO DE »POLA ESPERANTISTO«.

Por Garantia Fondo de nia gazeto deklaris pomonate:  
D-o Ignacy Dziedzic en Toruń zł. 10.—.

Pagis jam por Garantia Fondo de P. E.:

P-o D-o Bujwid por IV. — 30 zł.; por V. — 30 zł.; D-o Dziedzic por V. — 10 zł.;  
S-ino Neuberg por IV. — 10 zł.; S-o Pęksa por V. — 10 zł.; D-o Robin por IV. — 20 zł.;  
D-o Rosenstock por IV. — 10 zł.; S-ino Rubinstein por IV. — 10 zł.; por V. — 10 zł.

## II. GARANTIA ĆENO DE »POLA ESPERANTISTO«.

1. S-o Bolesław Głuchowski pagas 5 zł. kaj alvokas: S-inon B. Gdulowa (Nowa Biała); F-inon H. Domańska (Rosochacz) kaj S-ojn: S. Głuchowski (Kłóbka); F. Sielke (Zawda); A. Piltz (Kamienica); M. Mechowicki (Warszawa); T. Jaroński (Bielsk); W. Monarszyński (Więckowy); J. Fajtek (Temper); K. Wantuła (Makoszyce); G. Róg (Jędrzejów); M. Zajac (Halicz); T. Głowacki (Łagiewniki); A. Suprunowicz (Zadzienny); J. Stepkowski (Tarczyn); J. Stryjewski (Łuck).

2. S-o Izrael Lejzerowicz pagas 5 zł. kaj alvokas: P-ton Adam Furmanik (Leszno); F-inon Luiza Nadel (Lwów); kaj s-ojn Ch. Bronstein (Warszawa); Oberlaender (Czortków).

3. S-o S. Szulec pagante 5 zł. alvokas ges-ojn el Bydgoszcz: G. Elbaumowa kaj Zys.

4. P-o Resport pagas 2 zł. kaj alvokas P-inon Waldmannówna (Stryj).

5. P-o Mieczysław Sygnarski pagas 2 zł. kaj alvokas el Bydgoszcz s-ojn: Inspektoro A. Klimesz; Monowid; Wójcikiewicz; D-o Keiling; Teofil Szelner.

6. S-ino Luiza Srebrna pagas 2 zł. kaj alvokas geanojn de „Societo Esperanto“ en Kraków: Dym; Fallek; Goldberger; Spira kaj Wiesenberger.

7. S-o Józef Izraelewicz pagante 2 zł. alvokas ges-ojn: Jan Datko kaj Franz Faruga (Katowice); Wajeman kaj Holedorf (Olkusz); Loewenhof kaj Malinowicz (Sosnowice); J. Sztulman (Wilno).

8. D-o Jan Mędrkiewicz pagas 10 zł.

9. Leonard Borkowski pagas 2 zł.

10. Feliks Gross pagas 2 zł.

11. Karol Zajączkowski pagas 10 zł.

12. K. Chmielewski pagas 1 zł.

13. Salo Grenkamp pagas 5 zł.

14. P-to Wiśniewski pagas 2 zł.

15. Sinjoro Berman pagas 20 zł. kaj alvokas pagi laupovan sumon ciujn, por kiuj Esperanto estas kara.

!! VIVU SEKVONTOJ !!



Redaktor odpowiedzialny: Juliusz Kriss.

Drukarnia Muzeum Przemysł. pod kierownictwem St. Baranowskiego w Krakowie, Smoleńska 9



JULJUSZ SŁOWACKI

